

HU Guozhu (Esperanta nomo: Miĉino, Ecxino)



1938-02-03 naskiĝis en Wuhan. Jarfine de 1954 diplomiĝis el la Tekstila Politeknika Lernejo de Wuhan. Dum 1955 - 1966 laboris en la 1-a kaj 6-a Ŝtata Tekstila Fabriko de Zhengzhou, Henan-provinco. Ekde la majo de 1966 laboris en Huangshi. 1981 fariĝis inĝeniero. 1989 fariĝis supera inĝeniero. 1994 emeritiĝis.

1956: komencis memlernis Esperanton, la lernado daŭras dumvive. Dum 1959 - 1966 kontribuis tradukojn al la revuo El Popola Ĉinio.

1979: aliĝis al Hubei-a Esperanto-Asocio, funkciis kiel komitatano (1979-1986), vic-prezidanto (1986-2000), prezidanto (2001-2010).

1981: funkciis kiel prezidanto de Huangshi-a Esperanto-Asocio.

1990: aliĝis al ĈEL. Poste fariĝis konsilano kaj honora konsilano.

1983: membriĝis al UEA. 1989: al ILEI kaj fariĝis rajtigita ekzamenanto. 2004: al Esperantlingva Verkista Asocio (EVA).

Verkis la libron <Esperanta Metriko> (eldonita de Huangshi-a Esperanto-Asocio 1983). Aliaj verkoj <HU Parolas Maldelire> (2000), <Guozhu kaj Ni> (2006), <HU Laŭdas Verdakore> (2004), <Nefinlegebla Dante> (2006), <Ĉineska Gvidlibro> (2007), <Dek Mesaĝoj pri Esperanta Metriko> (2008), <Dek Mesaĝoj pri Rondelo> (2008), <Ĉina Galerio·108 Rondeloj de Guozhu> (2008), <Kantoj dum Vojaĝo de Homa Vivo> (poemoj en la ĉina). Eseon <Nova Floro kun Ĉina Odoro> (2007), librotrio <El Verda Klaravo> (2011 en tri volumoj), <Babiloj Sur Verda Monto> en du kolektoj po cent pecoj. La papera versio de la unua kolekto (n-ro 001-100) aperis en 2015 kaj tiu de la dua kolekto (n-ro 101-200) aperis en 2016.

1972 prove versis ĉineske, fariĝis iniciatinto de ĉinesko.

Kompilis lernolibron <Elementa Kurso de Esperanto>, eldonita de ĈEE 1992. (Ĉina Eldonejo de Esperanto)

Esperantigis la libron <Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero> de Lusin (1981, EPĈ). <Triptiko de Amrakontoj de Tang-dinastio> (1998, Penseo), <Senfina Bedaŭro kaj la Bivistino> (2000 HEA).

Ĉinigis la eseon de D-ro Zamenhof <Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia> (1980, Xinhua KEL). Kroata fabelo <Wakajtajpu> (2006, HEA)

Kunredaktis <Poemoj de Armand Su> (1992, ĈEE). Kuntradukis <Poemoj de Li Bai> (1997, Japanio), <Poemoj de Tang-dinastio> (2007 Ĉinio).

Redaktoro de Nova Floro (1980-1989), Penseo (1997-1999)

1987-3-29/30 CRI raportis pri <La Vojo de ĉina esperantisto Hu Guozhu>. EPĈ (!1996-10) raportis pri <Hu Guozhu en Esperantujo>.

2007-12-09 en la 7-a Ĉina Kongreso de Esperanto estis honorita per la Premio de Speciala Kontribuo por Ĉina EM.

2009 maje CRI disvidigis la intervjuon al Guozhu.

Inspirite de la fakto ke la Esp-igo de la Plena Teksto de <Strangaĵoj de Liaozhai> tradukita dum 30 jaroj neniam havas la ŝancon eldoniĝi, ekde 2003 memlernis fari eLibrojn kaj ĝis nun pli ol 30 eLibroj de Guozhu jam aperis interrete. <<http://www.elperno.cn/elibro/elibroj.htm>>

Ekde 2012 redaktis la rubrikon <Aprezo pri Ĉinaj Antikvaj Poemoj> por la retpaĝo El Popola Ĉinio. Papera kolekto <Babiloj Sur Verda Monto> aperis en 2015 (la unua kajero kun

cent pecoj) kaj en 2016 (la dua kajero).

Estas kunlaboranto de <La Gazeto> kaj <La Kancerkliniko>.

En 2016 akiris la titolon Honora Profesoro de Zaozhuang-a Universitato.